

Nun pri la demando : kial ?

La rolo de la megalitaj triboj estis grava en Azio. Ili fakte estis la pioniroj de civilizacio, de religiaj praktikadoj, de magio. La du fundamentaj pilieroj de iu ajn civilizacio fakte estis religio kaj magio, laŭ la du fundamentaj tendencoj en homoj antaŭ la ekzistado de scienco kaj de sciencaj esploradoj kaj klarigoj. Religio estas respondo al la kial-demandoj. Magio estas respondo al la problemoj : kiel regi, bridigi, superforti la eksterhomajn tutpotencajn fortojn de la Naturo. Tiuj ĝeneralaj faktoj helpas nin nun pli bone kompreni la signifon de la megalitoj. Ili estis konstruaĵoj religiaj kaj magiaj ĉar oni devas scii, ke magio naskis longatempe antaŭ la historiaj periodoj de antikvaj Greklando kaj Romo, sendube en Kaldeo. Tiu arto, kiu pretendis kunligi homojn kaj naturajn fenomenojn, povas esti konsiderata kiel praktika religio al kiu oni devas rilati kuracarton kaj astrologion. La disvastigo de magio povas esti klarigita per la historio de megalitaj triboj. La diversaj popoloj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ loĝas en la nordaj partoj de Eŭropo kaj Azio apartenas, laŭ ilia lingvistika unueco al granda popolo, kiu iam okupadis larĝegan teritorion antaŭ la arjaj grupoj. Mi ĵus parolis pri lingvistika unueco. Mi tiel taŭge povas paroli pri ilia religia unueco. Malgraŭ supraĵaj diferencoj, magiaj praktikadoj estis ĉiam pli malpli similaj. Legu la grandan nacian eposon de la Finnoj « Kalevala » verse tradukita en Esperanto, kaj vi pli bone komprenos tion, kion mi volas diri : kulto de spiritoj, de la kvar elementoj kaj de la Naturo ĝenerale.

La megalitoj, kies rolo estis religia, magia, estis uzitaj ne nur kiel tombejoj sed ankaŭ kiel kvazaŭ-preĝejoj. Kiam la keltoj alvenis, ili trovis popolojn organizitajn en triboj kaj en diversaj megalitaj religioj. La keltoj fakte ne konstruis tiujn primitivajn monumentojn ĉar ilia religio malpermesis tion al ili. La Druidoj malpermesis la konstruadon de temploj kaj ankaŭ la reprezentadon de Diaĵoj. Druida filozofio estas tre malbone konata ĉar skriban lingvon ili ankoraŭ ne posedis. Ĉio estis memorigita per kere. Kun ili komencis aŭ prosperis la kulto de bestoj. Unue, oni ne povis manĝi ilin ĉar ili estis konsiderataj kiel diaĵoj : leporoj, anseroj, kokinoj kaj kokoj ne estis, laŭ la druidoj, manĝeblaj. Kaj, laŭ la kutimo ĉe primitivaj religioj, tio, kio estis malpermesata, poste estis ege permesata laŭ alia nova ideo : se vi deziras havi la kvalitojn reprezentitajn en la bestoj nepre manĝu ilin kiel kuracilojn aŭ magiilojn !

Tiuj primitivaj kutimoj ne povis esti detruitaj de la sekvintaj religioj, kiuj konsekvence preferis gardi kaj adapti la antikvajn kredojn por konservi la plej grandan nombron da fideluloj. Kiam Kristanismo aperis, speciale en Bretonio, anstataŭ konstrui krucon apud megalitoj oni surmetis ŝtonan krucon sur la kultindan ŝtonegon. Kaj oni akceptis kokojn sur niaj preĝejoj. Kokoj estis respektataj ĉar oni kredis, ke ili helpis forpeli fulmobatojn. Kaj nun ? Nun, ĉar ni travivas sciencan epokon, ni povas vidi, sur niaj preĝejoj krucon, kokon kaj... fulmoŝirmilon !

ROBERT MARTIN.

